

# Eduard Inĝriŝ (1905 – 1991) – aŭtoro de trampa kanto Niagaro

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 31an de januaro 2024

Moto: *Navigare necesse est. – Je třeba plout. – Navigado necesas.*

Slogano de antikvaj maristoj.

## Junaĝo

Eduard Inĝriŝ naskiĝis la 11an de februaro 1905 en bohemia vilaĝo Zlonice apud Slaný. Lia patro estis violonisto, origine arma dirigento. Li laboris ĉe fervojo, pro tio lia familio ofte translokiĝis, sed fine ĝi setliĝis en Prago.

Eduard du jarojn kantis en Monaĥejo Břevnov ĉe benediktinoj. Li studis en mezlernejo kaj poste en instruista instituto. Jam kiel studento li en Teatro Aréna en Slup kantis, poste li en la sama teatro estis dirigento.

Li provis studi en Naturscienca Fakultato de la Karola Universitato en Prago, sed baldaŭ ekpreferis konservatorion.

Dum dimanĉa posttagmeza familia promenado lia patro atentigis siajn familianojn: “Antaŭ ni iras profesoro Josef Bohuslav Foerster, unu el niaj la plej bonaj komponistoj!” Kiam ili proksimiĝis al la profesoro, kiun la patro respektplene salutis, la profesoro vidante Eduardon diris: “Ho, via filo estas mia lernanto! Ofte mi lin vidadas en konservatorio. Certe li fariĝos bonega muzikisto.” Konsternita patro akceptis, ke Eduardo ne fariĝos natursciencisto, sed muzikisto, kaj sian filon subtenis ĝis fino de lia studado.

## Sukcesa muzikisto

Eduard Inĝriŝ fariĝis estimata komponisto kaj aŭtoro de sesdek operetoj kaj preskaŭ unu milo da melodioj. Li ekkomponis sian la unuan opereton *Inserát* (Anonco) kiam li estis 15jara. La opereto havis sian premieron la 12an de decembro 1925. Kiel la 24jara Inĝriŝ fariĝis dirigento. Granda talento, ĉar li komencis sian karieron tie, kie alia viro sian karieron finas. Li estas aŭtoro aŭ kunaŭtoro de ĉirkaŭ 60 operetoj kaj muzikaj komedioj.

Li kunlaboris ekzemple kun Rudolf Antonín Dvorský, kiu kantis lian serenadon “*Slib mi, že nebudeš plakat*” (“Promesu al Mi, ke Vi Ne Ekploros”) kun sia orkestro *Melody Boys* (Melodiaj Knaboj).

Li laboris en teatroj Osvobozené divadlo, Alhambra, Divadlo Jára Kohouta kaj Stavovské divadlo, renkontiĝis kun Jiří Voskovec, Jan Werich, Jaroslav Ježek, Ferenc Futurista kaj Vlasta Burian.

En radio li havis sian propran elsendadon, regulajn „Duonhorojn de Inĝriŝ“.

## Trampo

En libera tempo Inĝriŝ plene apartenis al trampo.

Angla vorto “*tramp*” origine signifis la ŝipon, kiu havis neniun regulan ŝiphoraron. La unuaj trampo en nia lando ĝuis akvajn sportojn kaj navigis sur kanuoj kaj pramŝipetoj. Ili ne admiris usonajn kovbojojn, sed aŭstrohungarajn maristojn. Pro tio eĉ nuntempaj trampo uzadas maristan saluton “Ahoj!” kaj en trampaj setlejoj neniam mankas flaga masto.

Post la unua mondmilito precipe junuloj sabate posttagmeze post laboro kuradis al fervoja stacidomo kaj ĝis dimanĉa vespero ili estis liberaj. Ili travivadis belan tempon en naturo, dormis en tendaroj aŭ kabanaroj, vespere kantis ĉe fajroj en trampaj setlejoj sub la gvido de ŝerifoj. Ili havis siajn kutimojn, humuron, poezion, muzikon kaj faris sportajn konkursojn. Ili uzadis trampajn kromnomojn, kiuj ofte estis anglaj (Joe, Mary) aŭ hispanaj (Dolores, Anita), sed plej ofte ĉeĥaj (Bíbr, Ťapka aj.).

Trampo ne estis skoltoj, ĉar al ili ne plaĉis strikta duonarma disciplino, kiun postulis fondinto de skolta movado, grandbritia kolonelo Baden-Powell. Trampo (“sovaĝaj skoltoj”) havis pli proksime al idealoj de Ernest Thompson Seton kun lia Arbara Saĝeco (*Woodcraft*) kaj ŝatis librojn de Jack London.

Kelkaj trampo verkis novelojn el usona Sovaĝa Okcidento, kiun ili neniam vizitis. Se ili estis saĝaj, ili konsiliĝis kun Zdeněk Matěj Kuděj, kiu en usono vagis, multfoje estis malliberigita, laboris kiel kovbojo, kaj pro tio li sciis vivon en vera Usono.

Al trampoj apartenis Jarka Mottl (tekstfaristo), Vlastimil Rada (pentristo), Jaroslav Žák (mezlerneja profesoro, humoristo), Zdeněk Burian (pentristo), Jiří Brdečka (verkisto), Jaroslav Štercl (komiko), Eva Olmerová (kantistino), Michal Tučný (kantisto), Miloslav Švandrlík (humuristo) k. a.

Aŭtoro de trampa himno „*Vlajka vzhůru letí*“ („Supren la Flago Flugas“, 1929) estis Jan Korda.

Ambaŭ totalismaj reĝimoj trampojn sincere malŝatis, sed ne kapablis ilin tute neniigi. Grandajn domaĝojn al trampoj kaŭzis konstruado de digolagoj, ĉar sub iliaj akvoniveletoj malaperis multaj trampaj setlejoj, kaj konsumata vivstilo de nuntempa socio.

### **Nostalgie Niagaro Muĝas**

Ankaŭ Inĝriŝ estis trampo, membro de trampa setlejo Margon (la setlejo jam ne ekzistas, ĉar ĝi malaperis sub akvo de digolago Slapy. En la jaro 1931 Inĝriŝ en sia trampa Nemuzikista Kabano apud Svatojánské proudy komponis sian plej faman kanton *Teskně hučí Niagara* (Nostalgie Niagaro Muĝas). En lingvo de indianoj el la gento Seneka akvofalo Niagaro nomiĝas Oŭragnarrah. La indianoj kredis, ke sub la akvofalo loĝas Manituo. Dufoje en la jaro ili ofertis la plej belan knabinon al Manituo. Oni la knabinon sidigis en boaton kaj lasis flosi al la akvofalo. Kiam la oferto estis belega Lelaŭala, ŝia patro volis ŝin en lasta momento savi, sed ankaŭ lia boato falis en la akvofalon.

Etburĝa socio de la 30aj jaroj, kiu facile toleris drogojn (precipe kokainon), perfidon, korupton, alkoholismon kaj aliajn nemoralajn kondutojn, trampojn ne ŝatis kaj ekkritikis ilin: „**Imagu, ke en unu tendo povas kune dormi geknaboj, kiuj ne estas geedzoj! Ho, Sodomo, ho, Gomoro!**“ – Jes, en tendo kaj kabanaj ofte dormadis gejunuloj kune. Sed vere etoso de trampa vivo estis surprizeble neseksoplana. Post tuttaga laboro en setlejo, turismo kaj sportaj agadoj la trampoj vespere sidis ĉirkaŭ fajroj, rikontis, amuziĝis kaj kantis... Se oni volus trovi drogojn, seksajn orgiojn kaj drinkadon, oni volus rigardi pli altajn sociajn tavolojn, precipe filojn de riĉaj patroj (tiel nomatan Oran Junularon), kiuj neniam estis trampoj.

La opereto Trampa Amindumo (*Trampské milování*, 1931) ekestis pro tio, ke praga urbestro Baxa postulis, ke en unu tendo povis dormi nur viro kaj virino, kiuj estis geedzoj. Striktaj kontrolantoj vizitadis trampajn setlejojn kaj kiu paro ne havis dokumenton pri geedziĝo, tiu estis punita. En tiu opereto la kanton Nostalgie Niagaro Muĝas kantis juna Ljuba Hermanová.

### **Se via amantino forpasis**

Inĝriŝ estis aŭtoro de la kanto „*Když odejde děvče*“ (“Se via amantino forpasis”).

En praga Strato Hus estis gastejo „U Vocílků“. Tien alvenis juna paro, 19jara Marie Zelenková kaj 21jara František Ottenschlager. Ili tagmanĝis. Poste juna viro pagis al muzikistoj 50 kronoj kaj petis ludi la kanton “*Když odejde děvče*” (“Se Via Amantino Forpasis”). La paro dancis kaj foriris al necesejoj. Ektimigitaj vizitantoj de la gastejo ekaŭdis diu pafojn. La knabo pafmortigis sian amantinon kaj poste sin mem. En sia adiaŭna letero Marie skribis, ke ŝi volonte foriros el la mondo kun knabo, kiu estas same malfeliĉa kiel ŝi. Se ili ne povas esti kune, ili faros komunan suicidon.

Post tragika evento, komuna suicido de junula paro, la kanto “Se Via Amantino Forpasis” fariĝis tre sukcesa. Multe da praganoj volis la kanton de Inĝriŝ ekscii kaj havi. Oni vendis cent milojn da gramofondiskoj kaj Inĝriŝ riĉiĝis.

Li estis ankaŭ aŭtoro de muziko de 11 filmoj (ekzemple por la filmo *The Gallant One*).

Lia plej sukcesa opereto *Rozmarné zrcadlo* (Kaprica Spegulo) el la jaro 1940 dum kvin jaroj havis 1 600 reprizojn.

### **Malliberulo de gestapo**

En la jaro 1944 gestapo Inĝriŝon tri monatojn malliberigis. Pro kio? Oni lin denunciis, ke li en tempo de Vintra Helpo (*Winterhilfe*) bruligis siajn skiojn kaj ne sendis ilin kiel helpon al germanaj soldatoj. (Ĉeĥoj, nacio de Ŝvejk, tiun devigan agadon kaŝe mokis kaj intence sendis al germanoj nur orelumojn. Milojn da oreluloj!) Kiu Inĝriŝon denunciis? Du ĉeĥinoj, teatraj dancistinoj. Ili faris la saman malbonon ankaŭ al aliaj homoj, kaj pro tio iu ilin en ilia loĝejo atakis kaj strangolis.

Post la milito (1945) Inĝriŝ dokumentis ekzekuton de germana nazia militkrimulo Karl Herrmann Frank, altstatura unuokula oficiro, kiu kaŭzis neniigon de bohemia vilaĝo Lidice. Frank fuĝis al usonanoj, sed ili lin donis al ĉeĥoj, la nazio estis juĝita kaj pendigita. Kameraisto Inĝriŝ tion filmis.

### **Komunistoj**

Inĝriŝ revis pri liberaj landoj de la mondo. Komunistoj lin ne ŝatis, ĉar li amis liberecon, estis talentita, laborema, sukcesa kaj riĉa. Por ĉeĥoslovakaj komunistoj Inĝriŝ estis „aŭtoro de dekliva burĝa kulturo, kiu ne estas taŭga por laborema kaj progresema civitano“.

Jen rememoro de Inĝriŝ el la jaro 1947:

„Iam mi en ĉambroj de Patrona Aŭtora Organizo (*Ochranná organizace autorská*) partoprenis en deviga renkontiĝo. Ekparolis ĉirkaŭ 28-jara diboĉulo, en Sovetunio edukita komponisto, kiu en longa prelego akre kaj arogante diris ĉirkaŭ tion: **“Tiu senmorala muziko por kontentigo de burĝaro kaj ĝiaj kapricoj devas fini. Ni bezonas sanajn komponistojn por futura nova kaj pli bona generacio. Seksoplenaj valsoj en stilo de Lehár devas malaperi!”** Poste li montris, kion oni devos komponi en venontaj jaroj. Sur gramofonon li metis malbone registritajn sovetajn gramofondiskojn kaj tion, kion ni ekaŭdis, nin ŝokis. ... **Kantaĉoj de rusaj marŝoj similis al hitleranaj marŝoj. Unusola diferenco inter ili estis nur tio, ke tiuj germanaj estis pli kvalite registritaj...**”

### Foriro eksterlanden

La 23an de decembro 1947 li veturis en Argentinon. En Buenos Aires ĉefo de opero estis lia amiko, elmigrinto Josef Kumok. Tial Inĝriŝ esperis, ke Kumok, kun kiu li antaŭ la milito kunlaboris, al li helpos trovi laboron en opero.

En Brazilo Inĝriŝ, kiu veturis kun du kofroj kaj 50 dolaroj, ĉar postmilita ĉeĥoslovaka banko al li – milionulo – ne pli multe donis, renkontiĝis kun sia eksa samklasanino el konservatorio. Marie BodlÁková estis edzino de d-ro Jan Ressler, ĉeĥoslovaka ambasadoro en Brazilo. Inĝriŝ eklaboris en Rio de Janeiro, ludis pianon dum koncertoj de BodlÁková kaj fotis.

En februaro Radio Rio de Janeiro lin informis pri komunisma puĉo en Ĉeĥoslovakio. La 25an de februaro 1948 komunistoj sub influo de sovetaj konsilantoj kaj la gvido de Klement Gottwald fariĝis regantoj de la ŝtato.

Inĝriŝ ankoraŭ ne multe komprenis portugalan lingvon, sed aŭskultante brazilan radion, li bone ekkomprenis, kion li en socialisma ŝtato atendus. Pro tio li decidis en socialisman ŝtaton ne reveni.

En Brazilo Inĝriŝ restis nur kun tranzita vizo kaj preskaŭ sen mono. Li, nun civitano de socialisma ŝtato, ne povis ricevi vizon por veturado en Argentino.

El Rio de Janeiro li foriris en urbon Belém, kie li estis ŝipa teĥnikisto, agordisto de pianoj, fotisto kaj instruisto de muziko. De tie li ŝipveturis kontraŭ fluo de Amazona rivero kaj post pli ol naŭ monatoj li trans Andoj kun falsaj personaj dokumentoj alvenis en Limon (Peruo).

### En Peruo

Tie li fariĝis estimata fotisto kaj kameraisto. Oficiale li fotis peruan prezidenton. Proprakoste li faris tri tutvesperajn filmojn. En Lima li fondis ĉeĥan teatron, instruis infanojn de ĉeĥa kolonio de Baĵa, direktis simfonian orĥestron kaj eldonis du albojn da kantoj. Li dediĉis sian kanton *Peru, mi amor* al edzino de prezidento kaj fariĝis perua civitano.

Li fariĝis konsilanto de Ernest Hemingway, kiu filmis sian novelon La Maljunulo kaj Maro (*The Old Man and Sea*). En la jaro 1949 li filmis ĉeĥoslovakajn vojaĝantojn Jiří Hanzelka kaj Miroslav Zikmund en Suda Ameriko (tio estis unusola filmo, kie baldaŭ vojaĝantoj estis filmitaj kune.). Ambaŭ vojaĝantoj tiam uzis aŭtobilon Tatra 87. La vojaĝantoj en Brazilo faris sian filmon Insuloj de Milionoj da Birdoj (*Ostrovny milionů ptáků*). En plaĝo Cochabamba (Rio de Janeiro) Ĵikmund preskaŭ dronis en la maro.

Usona aktoro John Wayne, kiu ludis en filmo Sabotado en Ĝangalo (*Sabotaje en la selva*), dum aŭskultado de gitara muziko de Inĝriŝ enamiĝis je sia tria edzino Pilar Palette.

Dum filmado de Mia Metio Estas Avanturo (*Adventure Is My Bussines*) pumo (*Pumo concolor*) Inĝriŝon vundis. Oni opiniis, ke li mortis, kaj pro tio Radio Libera Eŭropo elsendis duonhoron de lia muziko.

### Thor Heyerdahl

Signifa estis renkontiĝo de Inĝriŝ kun Thor Heyerdahl, kiu okazis en la jaro 1954. Fama nora marnavigisto, aventurulo, eksperimentala arĥeologo kaj antropologo faris interesan eksperimenton. Li diris, ke ĉe Peruo ekestas grandega Fluo Humboldt, kiu fluas okcidenten. En la jaro 1947 li kun kvin viroj sur repliko de balza floro Kon-Tiki 101 tagon (ekde la 28an de aprilo 1947 ĝis la 7an de aŭgusto 1947) floris el perua haveno Callao al atolo Raroia (7960 km). Tiel li pruvis, ke original loĝantoj de Suda Ameriko kapablis sur siaj balzaj floroj migri en Polinezion.

Balzo estas sudamerika arbo *Ochroma pyramidale* el la familio Malvaceae. Ĝi povas alti eĉ 30 m kaj havas malpezan lignon. Hispane balzo signifas floro.

## Kantuta

Post renkontiĝo kun Thor Heyerdahl Inĝriŝ decidis konfirmi teorion de Heyerdahl pri migrado de peruanoj en Polinezion. Li konstruis balzan flosan kun la nomo Kantuta. Ornamenta floro *Cantua buxifolia* el la familio Polemoniaceae kreskas en peruaj kaj boliviaj montaroj en la altitudoj 2 500 – 4 000 m. Kolibroj la florojn polenas. En keĉua lingvo ĝi havas nomojn *quantua* aŭ *quantuta*, en Bolivio oni ĝin nomiĝas *kantuta*. Ĝi estas simbolo de Bolivio, floro de inkoj,

Sur balza flosa veturis kvar viroj kaj unu virino, tiam 28-jara peruana studentino Natalie de Mazuelos. La 4an de decembro 1955 Kantuta ekfloris. Bedaŭrinde ĝi finis en marfluo, kiu cirkulis en unu loko. La 3an de marto 1956 flosistojn savis usona militŝipo Rehoboth.

## Kantuta la 2a

Inĝriŝ ne rezignis, gajnis monon, ricevis financan subtenon kaj konstruis novan balzan flosan. En la jaro 1959 li sukcese ripetis la eksperimenton kun Kantuta la 2a. Flosado daŭris kvar monatojn. Flosanaro sub la gvido de ĉeĥo Eduard Inĝriŝ akiris Polinezion same kiel antaŭe, en la jaro 1947, Thor Heyerdahl.

## Vivo en Usono

En la jaro 1962 Inĝriŝ el Peruo translokiĝis en Usonon, kie li edziĝis kun Nina Karpuŝkinová kaj setliĝis en South Lake Tahoe. Lia edzino Nina estis filino de kozako, tial ŝi kun siaj gepatroj timis de soveta armeo kaj la 13an de aprilo 1945 fuĝis el Protektorato Bohemio kaj Moravio en Usonon. (Tio estis necesa, ĉar malantaŭ batalantaj sovetaĵoj iris taĉmentoj de Smerŝ (rusa mallongiĝo de *Смерть шпионам!* - Morton al Spionoj!), kiu kaptis kaj neniigis rusajn elmigrantojn kaj ĉiujn, kiuj laŭ opinio de Stalin povis endanĝerigi Sovetunion. Nina estis pli juna ol Eduard – aĝa diferenco estis 26 jaroj – sed gedzoj vivis feliĉe.

En Usono al li helpis Florence Marley, aktorino kun ĉeĥaj radikoj. Inĝriŝ renkontiĝis kun verkisto Josef Škvorecký kaj kantisto Waldemar Matuška. Prezidento Ronald Reagan al Inĝriŝ gratulis al lia 80a naskiĝtago.

Eduard Inĝriŝ forpasis la 12an de januaro 1991 en Reno (ŝtato Nevada, Usono).

## Memoraĵoj

Kio restis? 60 operetoj, unu opero, unu simfonio, ĉirkaŭ milo da kantoj, 13 dokumentaj kaj kvar tutvesperaj filmoj, multe da fotoj.

En la jaro 1994 oni en Zlonice inaŭguris Memorano Halon de Eduard Inĝriŝ, kiu estas parto de Monumento de Antonín Dvořák. Arĥivaĵoj de Inĝriŝ estas en Muzeo de Sudorienta Moravio en urbo Zlín.

## Rekomendita literaturo

HEYERDAHL, T. 1964: Ve znamení Kon-Tiki. 1a eld., Prago, Mladá fronta, 209 paĝoj.

HURIKÁN, B. 1990: Dějiny trampingu. 2a eld., Prago, Novinář, 253 paĝoj.

INGRIŠ, E. 1942: Veselé učení na kytaru, Část I. (Na kytaru bez not). 3a eld., Prago, Mojmír Urbánek, 55 paĝoj.

KALEDOVÁ, H. 2016: Teskně hučí Niagara... Neuvěřitelná dobrodružství autora slavné písně.

<https://zpravy.tiscali.cz/teskne-huci-niagara...>

KRŠKO, J., MAREŠ, J., POHUNEK, J., RANDÁK, J. & ŠPRINGL, J. 2019: Český tramping v časech formování a rozmachu. 1a eld., Prago, Academia, 244 paĝoj.

LINHART, T. 2014: Historie trampské písně 3 – Operetní léta trampské písně. <https://www.trampsky-magazin.cz/blog/historie-trampske-pisne-3-operetni-leta-trampske-pisne-193.html>

LOJDOVÁ, S. 2021: Vyhlášený romantik s otevřeným srdcem. Písně legendárního trampa (†86) zpíval i Vlasta Burian. <https://www.super.cz/clanek/celebrity-vyhlaseny-romantik...>

NÁPLAVA, M. 2018: Plavby „sebevrahů“. 3a eld., Brno, Jota, 232 paĝoj.

NOVÁKOVÁ-PLEVOVÁ, E. 2017: Zdeněk Matěj Kuděj: věčný tulák. 1a eld., Pelhřimov, Nová tiskárna, 42 paĝoj.

ŠAROUNOVÁ, I. 2020: Trampům jde po sto letech jejich existence stále o to samé. Mají rádi přírodu, svobodu a kamarádství. <https://vysocina.rozhlas.cz/trampum-jde...>

ŠIKL, J. 1981: Legendy o Divokém Západě. 1a eld., Praha, Práce, 222 paĝoj.

URBANOVÁ, J. 2004: Brněnští mariňáci. Poslední veteráni rakouského válečného loďstva. 1a eld., Brno, Barrister & Principal, 155 paĝoj.

ZAJÍCOVÁ, R. 2019: Trampové jsou v Česku zase štvaná zvěř: policie na ně má tajnou zbraň.

<https://tn.nova.cz/zpravodajstvi/clanek/396894-trampove...>

### Personecoj

Baden-Powell, Robert (1857 – 1941)  
Baxa, Karel (1862 – 1938)  
Brdečka, Jiří (1917 – 1982)  
Burian, Vlasta, propranome Josef Vlastimil Burian (1891 – 1962)  
Burian, Zdeněk (1905 – 1981)  
Chlumecký, Josef (1903 – 1978)  
Dvorský, Rudolf Antonín (1899 – 1966)  
Dvořák, Antonín (1841 – 1904)  
Ferenc Futurista, propranome František Fiala (1891 – 1947)  
Florence Marley, propranome Hana Smékalová (1919 – 1978)  
Foerster, Josef Bohuslav (1859 – 1951)  
Frank, Karl Hermann (1892 – 1946)  
Gottwald, Klement (1896 – 1953)  
Hanzelka, Jiří (1920 – 2003)  
Hemingway, Ernest Miller (1899 – 1961)  
Hermanová, Ljuba (1913 – 1996)  
Heyerdahl, Thor (1914 – 2002)  
Hurikán, Bob, alikromnome Bob Peters, propranome Josef Peterka (1907 – 1965)  
Ingrišová, Nina, fraŭlinnome Karpuškinová (\*1931)  
Ježek, Jaroslav (1906 – 1942)  
Korda, Jan, kromnome Jenda Korda (1904 – 1986)  
Kuděj, Zdeněk Matěj (1881 – 1955)  
London, Jack (1876 – 1916)  
Marly, Florence (1919 – 1978)  
Matuška, Waldemar (1932 – 2009)  
Mottl, Jarka (1900 – 1986), propranome Jaroslav Mottl  
Olmerová, Eva (1934 – 1993)  
Rada, Vlastimil (1895 – 1962)  
Reagan, Ronald (1911 – 2004)  
Seton, Ernest Thompson (1860 – 1946)  
Škvorecký, Josef (1924 – 2012)  
Štercl, Jaroslav Václav (1919 – 1996)  
Švandrlík, Miloslav (1932 – 2009)  
Tučný, Michal (1947 – 1995)  
Voskovec, Jiří (1905 – 1981)  
Wayne, John (1907 – 1979)  
Werich, Jan (1905 – 1980)  
Zikmund, Miroslav (1919 – 2021)  
Žák, Jaroslav (1906 – 1960).